

A Vida no Além

Francisco Valdomiro Lorenz

Allan Kardec, no seu "O Livro dos Espíritos" (no capítulo III), ensina que a Alma, no instante da morte, volta ao mundo dos Espíritos, donde se apartara quando renascia no mundo físico. A Alma, depois da morte do corpo, conserva a sua individualidade; continua a ter um fluido, que lhe é próprio, haurido na atmosfera do seu planeta, e guarda a aparência de sua encarnação: o seu perispírito.

A Alma não leva consigo nada deste mundo físico, a não ser a lembrança das suas obras, boas e más; lembrança cheia de doçura ou amargor, conforme o uso que ela fez da vida. Quanto mais pura for, melhor compreenderá a futilidade do que deixa na Terra.

Já antes de Allan Kardec descreveu a vida no Além o notável vidente sueco Emanuel Swedenborg, que viveu no século XVIII. Na sua obra "O Céu e o Inferno", diz ele que o Espírito Humano, depois da morte do corpo físico, entra no Mundo dos Espíritos, sendo o seu corpo espiritual semelhante ao corpo físico que tinha na Terra, e que leva consigo a memória das suas ações,

La Vivo en la Transtombo

Francisco Valdomiro Lorenz

En "La Libro de la Spiritoj", dua parto, ĉapitro III, Allan Kardec instruas, ke en la momento de la morto la Animo revenas al la mondo de la Spiritoj, je kiu li disiĝis kiam li renaskiĝis en la fizika mondo. Post la morto de la korpo la Animo konservas sian individuecon; ĝi tenas plu ian fluidaĵon, kiu estas propra al ĝi, prenitane el la atmosfero de ĝia planedo, kaj konservas la aspekton, kiun ĝi havis dum sia enkarniĝo: la perispírito.

La Animo portas ĉe si nenion el ĉi tiu fizika mondo, escepte de la memoro pri siaj faroj, bonaj aŭ malbonaj; memoro plena de dolĉeco aŭ amareco, laŭ la maniero kiel ĝi uzis la vivon. Ju pli pura ĝi estos, des pli bone ĝi komprenos la frivolecon de tio, kion ĝi postlasos sur la Tero.

Jam antaŭ Allan Kardec, la fama sveda klarvidanto Emanuel Swedenborg, vivinta en la XVIII-a jarcento, priskribis la vivon en la Transtombo. En sia verko "Ĉielo kaj Infero" li diras, ke la Homa Spirito eniras en la Mondon de la Spiritoj post la morto de la fizika korpo, ke lia spirita korpo similas la fizikan korpon, kiun li havis sur la Tero, kaj ke li portas kun si la memoron pri siaj faroj

boas ou más, ouve, fala, tem olfato e gosto, pensa, reflete, ama ou odeia, mas o seu corpo não é material, e sim etéreo.

Estas declarações são confirmadas também por vários Espíritos, entre eles os que falaram por vozes diretas, com o sr. J. Arthur Findlay, como ele expõe no seu livro "No Limiar do Etéreo" (10). As suas perguntas receberam as seguintes respostas dos respectivos Espíritos: "Interpenetrando o vosso mundo físico, existe outro mundo, de substância em estado mais alto de vibração, e portanto não a sentis... Para nós, é muito real; mas as condições em que nos encontramos dependem da nossa mente... Não é material o nosso mundo, mas é real em tudo, é tangível, porém composto de substância em estado muito mais alto de vibrações do que a matéria que constitui o vosso mundo".

André Luiz conta no seu livro "Nosso Lar" (11) que, depois de um tempo de sofrimentos, devidos a seus erros e ignorância, percebeu que estava vivo num mundo semelhante à Terra, e que ali havia seres humanos que habitavam casas e podiam entrar em contacto uns com os outros. Ele foi recebido num grande edifício, onde recebeu tratamento e ensinos e foi-se fortalecendo.

No livro "No Limiar do Etéreo" lê-se que os Espíritos disseram ao sr. Findlay: "Todos os que se acham num mesmo plano, podem sentir as mesmas coisas. Podemos tocar os objetos que vemos;

(10) Traduzido por Guillon Ribeiro e editado pela Federação Espírita Brasileira, Rio, RJ. (Nota do Organizador)

(11) Recebido pelo médium Francisco Cândido Xavier, em 1943, editado pela Federação Espírita Brasileira, Rio, RJ, atualmente em 14a. edição, e já traduzido para o Esperanto, Castelhana e Japonês. (N. do O.)

bonaj aŭ malbonaj, aŭdas, parolas, sentas odoron kaj guston, pensas, rezonas, amas aŭ malamas, sed lia korpo ne estas materia, sed etera.

Tiuj deklaroj estas konfirmitaj ankaŭ de pluraj Spiritoj, inter kiuj, tiuj parolintaj per senpera voĉo kun S-ro J. Arthur Findlay, laŭ lia raporto en la libro "Ĉe la Sojlo de la Etera Mondo" (10). Liaj demandoj ricevis de la respektivaj Spiritoj la jenajn respondojn:

"Via fizika mondo kaj alia, el substanco en pli alta vibrostato, interpenetras, kaj vi tamen ĝin ne perceptas... Por ni ĝi estas tre reala, sed la kondiĉoj, en kiuj ni troviĝas, dependas de nia mensa... Nia mondo ne estas materia, sed ĉiurilate reala, tuŝebla, kvankam konsistanta el substanco en vibrostato multe pli alta ol la materio konsistiganta vian mondon".

En sia libro "Nia Hejmo" (11), André Luiz rakontas, ke post longa tempo de suferoj pro siaj eraroj kaj malklereco, li perceptis, ke li estas vivanta en mondo simila al la Tero, kaj ke tie troviĝas homaj estuloj loĝantaj en domoj kaj povantaj ekkontakti unuj kun la aliaj. Li estis akceptita en granda konstruaĵo, kie li ricevis flegadon kaj instruojn, kaj li komencis fortikiĝi.

En la libro "Ĉe la Sojlo de la Etera Mondo" oni legas, ke la Spiritoj diris al S-ro Findlay: "Ĉiuj, kiuj troviĝas en sama sfero, povas havi egalajn sensacojn. Ni povas tuŝi la objektojn, kiujn ni vidas;

(10) Portugallingva traduko de Guillon Ribeiro, eld. de BSF, Rio de Janeiro, RJ. — La Redakt.

(11) Ricevita per la mediumo Francisco Cândido Xavier, 1934, kaj eldonita de la Brazilia Spiritisma Federacio, Rio de Janeiro, RJ; nun en la 14-a eld., kaj jam tradukita en Esperanton, en la hispanan kaj en la japanan. — La Redakt.

podemos perceber e experimentar sensações da mesma maneira como vós. Comemos e bebemos, porém não como vós entendeis o comer e beber; para nós é uma condição mental, e não corporal". André Luiz disse que os Espíritos da sua esfera comem frutas etéreas quando querem ou precisam substituir forças mentais gastas.

No "O Livro dos Espíritos" (12) se lê: "Os Espíritos têm uns sobre os outros a autoridade correspondente ao grau de superioridade que eles exercem por um ascendente moral irresistível".

Kardec perguntou: "O poder e a consideração de que o homem gozou na Terra, lhe dão supremacia no mundo dos Espíritos?" E recebeu a seguinte resposta: "Não sabes que os Espíritos são de diferentes ordens conforme seus méritos? Pois bem, o maior da Terra pode pertencer à última categoria entre os Espíritos, ao passo que o seu servo pode estar na primeira. Disse Jesus: "Aquele que se humilhar será exaltado, e aquele que se exaltar será humilhado..." O título nada vale, a superioridade real é que tem valor".

O mesmo "O Livro dos Espíritos" ensina que os Espíritos das diferentes ordens se vêem, mas se distinguem uns dos outros. Evitam-se ou se aproximam, conforme a simpatia ou antipatia que reciprocamente inspiram uns aos outros, tal qual sucede entre os homens (e mulheres) na Terra. Constituem um mundo, do qual o mundo físico é pá-

(12) Allan Kardec, "O Livro dos Espíritos", questões nros. 274, 275 e 277. (N. do O.)

ni povas percepti kaj sperti sansacojn sammaniere kiel vi. Ni manĝas kaj trinkas, sed ne kiel vi komprenas la manĝadon kaj la trinkadon; por ni ĝi estas ia kondiĉo mensa, kaj ne korpa". André Luiz diris, ke la Spiritoj de lia sfero manĝas eterajn fruktojn, kiam ili volas aŭ bezonas restarigi mensajn fortojn eluzitajn.

En "La Libro de la Spiritoj" (12) oni legas: "La Spiritoj havas, unuj super la aliaj, aŭtoritaton konforman al ilia supereco kaj kiun ili ekzercas per nekontraŭstarebla morala influo".

Kardec demandis: "Ĉu la povo kaj la ŝato, kiujn iu homo ĝuis sur la Tero, havigas al li ian superecon en la spirita mondo?" Kaj li ricevis la jenan respondon: "Ĉu vi ne scias, ke la Spiritoj apartenas al diversaj ordoj, laŭ siaj meritoj? Nu! La plejgranda sur la Tero povas esti unu el tiuj apartenantaj al la lasta klaso, dum lia servisto mem povas esti unuaklasa. Jesuo diris: "Kiu sin plialtigos, tiu estos humiligita; kaj kiu sin humiligos, tiu estos plialtigita". "La titolo neniom valoras: la reala supereco estas la sola grava". (12-1)

La sama "La Libro de la Spiritoj" instruas, ke la Spiritoj de diversaj ordoj vidas sin reciproke, sed ili distingas unujn je la aliaj. Ili malproksimiĝas aŭ alproksimiĝas, laŭ la analogeco aŭ antipatio de la reciprokaj sentoj, same kiel okazas ĉe viroj (kaj virinoj) sur la Tero. Tio estas tuta mon-

(12) Allan Kardec, "La Libro de la Spiritoj", demandoj n-roj 274, 275 kaj 277. — La Redakt.

(12-1) La ĉi-tieajn transskribaĵojn el "La Libro de la Spiritoj" de A. Kardec, mi prenis el la klasika Esperanta traduko farita de la karmemora Prof-o D-ro P. C. Neto. — La Trad.

lido reflexo. Os da mesma categoria se reúnem por uma espécie de afinidade e formam grupos ou famílias, unidos pelos laços de simpatia e pelos fins que visam; os bons pelo desejo de fazerem o bem; os maus pelo desejo de fazerem o mal... Os bons vão a toda parte, mas as regiões onde os bons habitam, estão interditadas aos Espíritos imperfeitos, a fim de que não os perturbem com suas paixões inferiores.

André Luiz também fala da existência de diferentes regiões espirituais, inferiores e superiores. Ao princípio da sua vida no Além caminhava como na Terra; mais tarde aprendeu a locomover-se por meio da volição; nem sempre, porém, era possível aproveitar tal processo de viagem rápida.

Allan Kardec diz no livro "O Céu e o Inferno" (13): "O Espírito sofre na vida espiritual as consequências de todas as imperfeições que não conseguiu corrigir na vida terrestre. O seu estado, feliz ou desgraçado, é inerente ao seu grau de pureza ou impureza. A completa felicidade prende-se à perfeição, isto é, à purificação completa do Espírito. Toda imperfeição é, por sua vez, causa de sofrimento e de privação de gozo... Não há inferno eterno; ele está por toda a parte onde haja Almas sofredoras, e o céu igualmente está onde há Espíritos felizes... A duração do castigo depende da melhoria do Espírito culpado..."

No mesmo livro é descrita a sorte de vários Espíritos e seus graus: Espíritos felizes, Espíritos em condições medianas, Espíritos sofredores, Espíritos de suicidas, Espíritos de criminosos arrependidos,

(13) Allan Kardec, "O Céu e o Inferno", 1a. Parte, Cap. 7 (N. do O.)

do, kaj de ĝi la via estas nur pala bildo. La samordaj Spiritoj kolektiĝas pro ia altirforto, kaj formas grupojn aŭ familiojn el Spiritoj, kuntenataj de simpatio kaj komunaj celoj: la bonaj, de la deziro fari bonon; la malbonaj, de la deziro fari malbonon..." "La bonaj iras ĉien; sed la regionoj loĝataj de la bonaj spiritoj estas fermitaj por la neperfektaĵoj, por ke ĉi tiuj ne alportu tien la konfuzon, kiun kaŭzus la malnoblaj pasioj".

Ankaŭ André Luiz parolas pri la ekzisto de diversaj spiritaĵoj, malsuperaĵoj kaj superaĵoj. En la komenco de sia vivo en la Transtombo li iradis same kiel sur la Tero; poste li lernis ĉien iri per flugo; sed ne ĉiam eblis uzi tiun procedon de rapida vojaĝo.

En la libro "Ĉielo kaj Infero" (13), Allan Kardec diras: "En sia spirita vivo la Spirito suferas la sekvojn de ĉiuj neperfektaĵoj, kiujn li ne sukcesis forigi dum la surtera vivo. Lia stato, feliĉa aŭ malfeliĉa, estas propra al lia grado de pureco aŭ nepureco. La kompleta feliĉo estas ligita al la perfekteco, tio estas, al la kompleta purigado de la Spirito. Ĉia neperfektaĵo estas siavice kaŭzo de sufero kaj de senigo je ĝuo... Ne estas eterna infero; ĝi troviĝas ĉie, kie estas suferantaj Animoj, kaj la ĉielo sammaniere troviĝas tie, kie estas feliĉaj Spiritoj... La daŭro de la puno dependas de la reboniĝo de la kulpinta Spirito..."

En tiu sama libro priskribiĝas la sorto de diversaj Spiritoj kaj ties gradoj: feliĉaj Spiritoj, mezgradaĵoj Spiritoj, suferantaj Spiritoj, Spiritoj de memmortigintoj, Spiritoj de pentantaj krimuloj,

(13) Allan Kardec, "Ĉielo kaj Infero", 1-a Parto, ĉap. 7. — La Redakt.

Espíritos endurecidos, etc. Nos livros de André Luiz também há tópicos que se referem às Esferas Espirituais mais elevadas, e outras que descrevem regiões de sofrendores.

Um dos trechos mais comoventes do livro "Raymond", de Sir Oliver Lodge, célebre físico inglês (14), é a descrição da visão do Cristo, que foi concedida ao Espírito de Raymond, filho do dito cientista, como prêmio e como encorajamento de prosseguir na missão de disseminador das Verdades Espirituais.

A vida no Além também é descrita no livro "A Vida Além do Véu", do Rev. G. Vale Owen (15): o Espírito de sua mãe, entre outras comunicações disse: "Nossas ocupações variam de acordo com as necessidades daqueles a quem prestamos assistência. São várias, porém têm em vista o progresso dos que ainda estão na vida da Terra... Quanto à nossa casa: É muito luminosa e bela; os nossos amigos das esferas superiores vêm, continuamente, a nós, a fim de animar-nos em nossa jornada ascendente... Na nossa esfera há montes, rios, belas florestas, muitas casas; tudo foi preparado pelos que nos precederam. Trabalhamos, atualmente, por nossa vez, construindo e regulando tudo para os que, ainda durante algum tempo, têm que continuar a sua luta na Terra. Quando eles vierem, encontrarão tudo pronto e preparado para recebê-los".

O Além, como muitos Espíritos disseram, é semelhante à Terra, porém mais aperfeiçoado nas

(14) Traduzido por Monteiro Lobato e editado pela Gráfica e Editora Edigraf S.A., São Paulo. (N. do O.)

(15) Traduzido por Carlos Imbassahy e editado pela Federação Espírita Brasileira, Rio, RJ, (N. do O.)

malmolkoraj Spiritoj, ktp. Ankaŭ en la libroj de André Luiz troviĝas topikoj pritraktantaj la plej altajn Spiritajn Sferojn kaj aliaj priskribantaj regionojn de suferantoj.

Unu el la plej kortuŝaj pecoj de la libro "Raymond", de Sir Oliver Lodge, mondfama angla fizikisto (14), estas tiu, kiu priskribas la vidon je la Kristo, permesitan al la Spirito de Raymond, filo de la menciita scienculo, kiel premion kaj kuragigon, ke li ne forlasu sian mision de disvastiganto de la Spiritaj Veraĵoj.

La transtomba vivo estas priskribita ankaŭ en la libro "La Vivo post la Vualo", de lia pastra moŝto G. Vale Owen (15): inter aliaj komunikaĵoj, la Spirito de lia patrino diris: "Niaj okupoj varias laŭ la bezonoj de tiuj, al kiuj ni helpas. Ili estas diversaj, sed tamen celas la progreson de tiuj, kiuj vivas ankoraŭ sur la Tero... Rilate nian domon: ĝi estas luma kaj bela; niaj amikoj el la superaj sferoj senĉese venas al ni, por nin animi ĉe la ascenda vojaĝo... En nia sfero estas montoj, riveroj, belaj arbaroj, multaj domoj; ĉio estas preparita de tiuj, kiuj nin antaŭis. Nun ni laboras, konstruante kaj reguligante ĉion por tiuj, kiuj ankoraŭ certan tempon devos daŭrigi sian lukton sur la Tero. Kiam ili venos, tiam ili trovos ĉion preta kaj preparita por ilin ricevi".

Kiel pluraj Spiritoj diris, la Transtombo similas la Teron, sed ĝi estas pli perfekta en

(14) En la portugalan lingvon tradukita de Monteiro Lobato, eld. de Gráfica e Editora Edigraf S.A., S. Paulo. — La Redakt.

(15) Portugallingva traduko de Carlos Imbassahy; eld. de la Brazilia Spiritisma Federacio, Rio de Janeiro, RJ. — La Redakt.

suas esferas elevadas; as esferas baixas parecem-se com o que se denomina "purgatório" e até "inferno", porém até nas esferas infernais as Almas podem progredir e de lá elevar-se a esferas altas. Depende delas a sua elevação; os Anjos Divinos as auxiliam em todas as aspirações boas, e alegram-se quando podem salvar qualquer dessas Almas decaídas.

No mundo dos Espíritos, como vários Espíritos comunicaram, o Pensamento é de grande importância; as Almas se comunicam entre si pelo Pensamento; e pela força do Pensamento, combinada com a Vontade, podem criar as coisas de que têm necessidade. Mas é preciso uma concentração firme do Pensamento sobre o objeto, e pensar em todos os seus detalhes.

É costume geral dos Espíritos no Além acolherem e guiarem as Almas recém-desencarnadas, antes que estas caiam numa espécie de sono, chamado "sono reparador". E são unânimes em afirmar que, no mundo espiritual, quando se acham sós e tomadas de quaisquer incertezas ou perplexidades, percebem uma Voz que lhes chega de longe e as aconselha sobre o que devem fazer; é uma Voz vinda de Espíritos amigos, os quais, tendo-lhes percebido, de modo telepático, os pensamentos, apressam-se em transmitir-lhes seus conselhos. (16)

(16) Trabalho publicado na revista "A Reencarnação", de Porto Alegre, RS, setembro-outubro de 1953, pp. 4-5. (N. do O.)

siaj altaj sferoj; la malaltaj sferoj similas tion, kio nomiĝas "purgatorio" kaj eĉ "infero", sed eĉ en la inferaj sferoj la Animoj povas progresi kaj de ĝi altiĝi al la altaj sferoj. De ili mem dependas ja ilia altiĝo; la Diaj Anĝeloj ilin helpas ĉe ĉiaj bonaj aspiroj, kaj ĝojiĝas kiam ili povas savi kiun ajn el tiuj falintaj Animoj.

Laŭ komuniko de pluraj Spiritoj, en la spirita mondo la penso estas tre grava; la Animoj komunikigas inter si per la Penso; kaj per la forto de la Penso, kombinita kun la Volo, ili kapablas krei la aferojn, kiujn ili bezonas. Sed estas necesa firma koncentriĝo de la Penso sur la objekto, kaj ankaŭ pensi pri ĉiuj ĝiaj detaloj.

En la Transtombo estas ĝenerala kutimo, ke la Spiritoj elektu kaj gvidu la ĵus elkarniĝintajn Animojn, antaŭ ol ĉi tiuj falos en ian dormon nomatan "riparanta dormo". Kaj la Spiritoj unuvoĉe asertas, ke, troviĝante solaj kaj en dubo aŭ hezito, la Animoj perceptas ian voĉon al ili venantan de malproksime kaj ilin konsilantan pri tio, kion ili devas fari; ĝi estas Voĉo de amikaj Spiritoj, kiuj, perceptinte iliajn pensojn per telepatio, rapidas doni al ili siajn konsilojn. (16)

(16) Verko publikigita en la revuo "A Reencarnação" (Reenkarniĝo), el Porto Alegre, ŝtato Rio Grande do Sul, Septembro-Oktobro 1953, pĝ. 4-5. — La Redaktoro.